


# PONTO ☆

Jaro 5 N-ro 3 (28) Organo de Sunda Esperanto Agado septembro 2006

# Okazos en Kopenhago

## 16/9 Internacia tago

arangîta de Kopenhaga Komunumo, ĉe Peblinge Dossering (Dronning Louises Bro) je h 12 - 18.
Ni havos budon kaj partoprenas la distradon kun muziko sur la scenejo.

## 23/9 LingvoFestivalo.

KEK aranĝos kune kun Verdensklubben kaj studentoj ĉe KUA la unuan lingvofestivalon en Danio. Ĝi okazos en Københavns Universitet Amager (KUA), Njalsgade 80, en la malnova danlingvo-kantino.




20-30 lingvoj sin prezentas ek de la 11a horo ĉe budoj kaj dum 1/2-horaj prezentadoj en apudaj ĉambroj. De la scenejo estos diversa kultura distrado de la diversaj lingvoj.
La tuto finos je la 17a horo.

## 13/10 Kultura Nokto

En Vesterbro Biblioteko, Lyrskovgade 4, estos eta ekspozicio je h 18.00 - 24.00.
Je h 20.15 - 21.00 koncerto de Esperanto De Luxe

# SEA-kunveno en Helsingborg sabaton la 21-an de oktobro 2006



Bonvenon al Verdandi-villan, Brevduvevägen 4, Ättekulla, Helsingborg,
je la 11-a horo ĝis la 15-a horo.

**Tagordo** (jam tradicia):
1. Elekto de gvidanto kaj protokolanto
2. Raportoj pri la pasinta periodo
3. Laborplanoj en la kluboj
4. Kursoj kaj aranĝoj
5. Ponto
6. Ekstera informado
7. Ceteraj demandoj
8. Venonta SEA-kunsido

Ni preparos kafon kaj teon. Por tagmanĝo vi havos du elektojn: kunporti mem (kuirejo kun mikroonda forno troviĝas) aŭ iri al Burger King je kelkminuta promenaddistanco.

**Vojpriskribon vi trovos sur paĝo 8.**

Bonvenon!
Ann-Louise Åkerlund

Nästa **Ponto**, nr 4
utkommer ca 21/10
Skicka allt material till *Karin Lindquist*
**senast den 7/10**

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado)



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

***Jaro 77  N-ro 3 (697)*  >>ĉiam antaŭen<<**

Fondita en 1906


## El la kluba vivo

Tute hazarde nia kluba kunveno okazis la **12-an de aprilo** – la ĝusta tago por nia cent-jara jubileo! Per-Olov Johansson regalis nin per ŝaumanta ĉampanvino kaj al la kafo ni ĝuis pomkukon farita de Asta Schaedel. Okaze de la jubileo Anna-Maria Lange transdonis libron en la nomo de la Esperantoklubo de Lund

Post la gaja enkonduko Anna-Maria ekzercis nin en la uzo de la litero ”n” en esperanto – do ni havis ankaŭ seriozan programeron.

La lasta **kunsido** de la sezono okazis la **26.4** sub gvido de la prezidanto Sten Svenonius

Pri la **aŭtunaj kursoj** estas notinde, ke Zita Garbaraviciené, Kopenhago, proponas kurson laŭ naturmetodo en Malmö dum 5 semajnfinoj (10 tagoj) kun po 4 horoj je malalta kotizo. La konversacia kurso komenciĝos lunde la 18.9 je la 14-a horo sub gvido de Per-Olov Johansson.

## Tagordo 9.11

1 Elekto de protokolkontrolanto
2 Diskuto kaj decido pri printempaj kursoj
3 Diskuto kaj decido pri printempaj programeroj
4 Eventualaj elektoj
5 Abono je esperantogazetoj
6 Raportoj kaj informoj
7 Ceteraj demandoj

Bonvenon al la ordinara kunsido!


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27  MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2
Prezidanto:
*Sten Svenonius*    *sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


## Rememoroj pri la kongreso

Jam pasis 3 monatoj de kiam ni festis nian 100-jaran jubileon kaj la kongreson, kaj estas tempo sumigi la eksterajn kontaktojn.

Dum la kongresaj laboroj multe helpis nin la urbo Malmö. Karin Björnsson, Malmö Turism, helpis nin ne nur pri kontaktoj sed ankaŭ pri diversaj materialoj. Granda atingo estas la fakto ke la urba retpaĝo, www.malmo.se, ekuzis esperanton kiel unu el la lingvoj por prezenti la urbon.
Nian novaĵleteron al la gazetaro, radio kaj televido la urbo subtenis per propra novaĵletero tuj antaŭ la kongreso.

Unua vicurbestro kaj vicprezidanto de la deputitaro, Lena Jarnbring-Lindholm tre afable salutis la kongreson kaj transdonis la urban blazonon al la klubo. Krome la urbo regalis per trinkaĵoj ktp dum la inaŭguro en la aŭlo de Jörgen Kocksgymnasiet.

Pri la kongreso estis multaj raportoj. TV4, Radio Malmöhus kaj Malmökanalen, Sydsvenskan, Skånska Dagbladet kaj Spegeln havis intervjuojn. Multaj malgrandaj noticoj aperis diversloke.

Martin Lövstrand de la urba biblioteko multe subtenis nian ekspozicion kaj provlecionon kun Lars Forsman, la 25.4. Li ankaŭ instruis 2 klasojn en lernejo Kirseberg kun 12-jaruloj.

Kvarnby Popolaltlernejo subtenis per malmultekosta kongresejo kaj iom subvenciis la kongreson. La organizoj Sensus Studieförbund kaj Skånes Bildningsförbund subtenis ekonomie.

La sveda eklezio afable disponigis la preĝejon S:t Pauli.

Mi tre dankas la komitatanojn, Karin Lindquist, Per-Olov Johansson, Karin Rylander, Gerd Rodén, Alf Mobark kaj Gertrud Lund, pro fervora kaj bona kunlaboro!

Sten Svenonius

# Kontaktilo

***Membrogazeto de K.E.K***
***Konversacia Esperantista Klubo***
***Kopenhago***
**N-ro 3 (667) 2006 70a-jaro**


## Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA

Kalvebod Brygge 32. Aŭtoj uzu la ramplon, piedirantoj uzu ŝtuparon „trappetårn 32“. Kunvenas lundojn inter 19.00 - 21.30. Kursoj kaj legogrupo ekde 18.45. Programo: 19.30 - 20.15 + 20.45 - 21.30. Paŭzo kun ebleco aĉeti kafon/teon kaj bieron/akvon 20.15 - 20.45.
Kontaktulo: Lene Niemann, Hovedvagtsstræde 9 E, 1., 3000 Helsingør, tel 49 26 13 19
Retadreso niemann@kabelmail.dk

**Esperantoskolen,** Ny Kongensgade 21
Intensiva unumonata kurso komenciĝos lunde la 11.9. Instruado okazos ĉiujn labortagojn de la semajno dum la periodo 11.09 - 06.10 je horo 18.15 - 20.15. – Krome okazos sabataj posttagmezaj kunvenoj unu fojon monate, ordinare la duan, je h 15.00. Kontaktulo: Ole Blaust, Ny Kongensgade 18, 1557 København V, tel 3333 9030
Retadreso zita@esperantoskolen.dk

**Den Classenske Legatskole,**
Vester Voldgade 98, ĉambroj 17+18, 2a etaĝo.
Kursoj ĉiuĵaŭde ek de 05.10. (escepte de lernejaj ferioj) je h 18.45. Kontaktulo: Kim J Henriksen, Hallandsgade 6, 4., 2300 København S
Tel 32 54 93 54, retadreso kek@esperanto.dk

**16/9 Internacia tago**
**23/9 Lingvo Festivalo**
**13/10 Kultura Nokto**

*Pri la supraj programoj rigardu sur paĝo 1!*



**Roma Thorsen mortis** – 87-jaraĝa – en julio en fleghejmo, kie ŝi lastatempe loĝis. Kiel instruistoj ŝi kaj Poul prelegvojaĝis en Italio vizitante lernojojn. Ili ankaŭ sciis fungekskursi kaj instrui nin. ”Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen”, aranĝita ĉe UEA, montris ilian donacemon al la esperantistaro. Duonan jaron post la forpaso de la edzo nun ankaŭ pacon al Roma!




## Diplomo kun honora mencio

al **Kim Henriksen** pro "3 muzikvideoj", laŭ rezultoj de la belartaj konkursoj de UEA 2006: Filmo: 1-a kaj 2-a premioj: ne aljuĝitaj. 3-a premio: Joe Brazlio Costa (Brazilio) pro "Tiel estas la vivo". - El diskuto pri kio estas filmo, oni decidis pri la diplomo al Kim. Gratulon!

**Kalvebod Brygge** (KEK/DEFA)
Lu 04.09: – Legogrupo + La unua prelego en serio de ses kun titolo *La origino de ĉio*: Rut Jesus prelegos pri ’La origino de la universo’.
Lu 11.09: – Legogrupo + Mogens Rude Andersen distros Serpentuma krucvortenigmo pri esperantaj verkoj.
Lu 18.09: – Legogrupo + Somerstudado – ni traktos elektitajn ĉapitrojn de *Faktoj kaj Fantazioj*.
Lu 25.09: – Legogrupo + La dua prelego en la serio ’La origino de ĉio’: Rut Jesus prelegos pri *La origino de la sunsistemo.*
Lu 02.10: – Kursoj, legogrupo kaj studgrupoj.
Lu 09.10: – Kursoj, legogrupo + Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi.
Lu 16.10: - Kursoj, legogrupo kaj studgrupoj.
Lu 23.10: - Kursoj, legogrupo + La kvara prelego en la serio ’La origino de ĉio’: Jens S.Larsen prelegos pri *La origino de la homo.* (La tria prelego okazos en Medborgerhuset la 11.10).

**Esperanto-skolen, Ny Kongensgade 21** (KEK)
Sa 28.10: Ludoj per esperantaj ludiloj.
Sa 11.11: Traduko de turismaj informoj pri Kopenhago.
Sa 09.12: Julfesto, danlingva, kune kun najbaroj.



*Klubo Esperantista de Helsingborgo*

Karaj geamikoj!

Post varma somero estas tempo reaktiviĝi. Ek de julio mi denove laboras, post mia libera jaro. Ĝi tro rapide forflugis! Kiel mi skribis en la antaŭa numero de Ponto, mi estis en Tajlando dum aprilo. Bedaŭrinde mi ne sukcesis kontakti la esperantistojn en Nakhon Ratchasima-Korat. Alia ”malsukceso”; pro miskomprenoj ne okazis la prelegojn en la kluboj kun internacia membraro, kiujn mi menciis.

La prelegon de Bertil Nilsson 13/5 aŭskultis deko da personoj, la plejparto jam esperantistoj. Sekvis iom da diskutoj kaj poste kelkaj el ni daŭrigis la babiladon en kafejo.

La 11-an de junio estis varmega tago, kiam ni havis informbudon en la sportejo Heden dum la kultura tago, eble tro varma por tia aranĝo. Kelkaj homoj tamen informiĝis pri esperanto, rigardis la librojn kaj prenis broŝurojn.

Kio okazos estonte ĉe ni? Ni planas du prelegojn en la urba biblioteko, verŝajne la 28-an de oktobro kaj la 25-an de novembro. Legu pri tio en la kalendaro de **agado.net**. Ni havos klubkunvenojn la 19-an de aŭgusto en la kafejo de la biblioteko, la 16-an de septembro (kiam ni invitas al ekskurso, vidu poste), la 21-an de oktobro lige al la SEA-kunveno kaj la 18-an de novembro en la biblioteko. Krome, ni daŭrigos nian studrondon ĉe Barbro. Pri eventuala kurso por komencantoj ni ankoraŭ ne decidis.

**Invito al ekskurso**
La 16-an de septembro ni kolektiĝos je la 11-a horo ĉe Barbro Haraldsson en Furugatan 10 (por vojpriskribo voku 042-291262 aŭ 042-186639 (Ann-Louise) aŭ 042-121471 (Barbro). Kunportu kafon kaj/aŭ manĝaĵon por pikniko en la ĝardeno. Poste ni promenos dum proksimume tri horojn tra la urboparto Planteringen, rigardante la diversstilajn arkitekturojn. Fine eblas denove kafumi en la ĝardeno de Barbro. Tio signifas, ke vi ne devos kunporti vian piknikon dum la promenado. Bonvenon!

Ann-Louise

---

La Esperanto Klubo de Lund

Kunvenoj en la klubejo

14/9 12/10 16/11

Koran bonvenon!
Allan Ljungstedt

| Kiam/När? | Kie/Var? | Kio/Vad? |
|---|---|---|
| 2006-09-03 | KEM, Malmö | Autuna festo en Beijers Park arangota de la urboparto. La klubo informos |
| 2006-09-06 | KEM, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo en n-ro 2 pago 2.<br><br>Poste ni spektos fotojn de la jubileo kaj kongreso |
| 2006-09-11 | KEK/DEFA, Kph | Mogens Rude Andersen distros kaj laborigos nin per tasko: Serpentuma krucvortenigmo pri esperantaj verkoj |
| 2006-09-14 | LEK, Lund | Kunveno |
| 2006-09-15 | KEKG, Kph | C.M. Bellman - mozaikoj el la multfaceta vivo de la fama sveda kanzonisto. Prelego de Torben Svendsen |
| 2006-09-16 | KEH, Helsingborg | Ekskurso vidu sur pago 4 |
| 2006-09-20 | KEM, Malmö | Memoroj de la pasinta somero rakontitaj de ciuj |
| 2006-10-04 | KEM, Malmö | Miaj travivajoj dum la UEA-kongreso en Florenco. Urszula Kwasniewska rakontos |
| 2006-10-11 | KEKG, Kph | ”La origino de la vivo” Kiam kaj kiel okazis la transiro de ne-vivo al vivo? Rut Jesus asistate de Jens S. Larsen prelegos |
| 2006-10-12 | LEK, Lund | Kunveno |
| 2006-10-14 16.00 h | KEM, Malmö | Autuna festo - Asta Schaedel rakontos pri renkontoj kun esperantistoj en Japanio |
| 2006-10-21 11.00 h | SEA, Helsingborg | Bonvenon al SEA-kunsido en Helsingborg. Vidu pago 1 |
| 2006-10-25 | KEM, Malmö | Ni ordigos la multajn klubajn fotojn, malnovajn k. novajn |
| 2006-10-28 | KEH, Helsingborg | Planata kunveno en la Biblioteko |

**Rigardu www.agado.net por pli da programoj!**

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan
jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h.
en la ejo de nia studorganizo SENSUS,
Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en
.Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund
tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe
Barbro Haraldsson tel. 042-121471

*Retpaĝo de SEA*
*www.agado.net*

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA. Vidu la informojn
tie. Prezidanto: Kim J. Henriksen, tel. 0045-32
54 93 54. Rete: kek@esperanto.dk

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranĝoj en Medborgerhuset,
Danasvej 30 B, atingebla per
buslinio 29 el stacio
Vesterport,salono n-ro 1,
dua etaĝo. Pordoj malfermitaj 19.00-23.00.
Ĉiu prelego okazos ĉ . 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas
demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al
Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
Persone al la kontaktulo de KEKG:
Torben Svendsen: esperanto@webspeed.dk
Al la asocio - KEKG: kulturgrupo@webspeed

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenas lundojn inter 19.30-22.00 en
Banedanmark, entreprise, Vasbygade 10.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la (krd)pordo.
Kontaktulo: Lene Niemann,
tel. 0045-49 26 13 19
Rete: niemann@kabelmail.dk
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

## SEA-kunveno en Helsingborg sabaton la 21-an de oktobro

### Vojpriskribo:

E6/E20, Helsingborg syd, Ättekulla, dekstren sub la aŭtoŝoseon, tuj dekstren en la rondiro.
Rekte laŭ Rusthållsgatan tra alia rondiro, preter la magazeno Eko, serĉu la duan strateton maldekstren. Ŝildo montras al Verdandi.

De Knutpunkten oni povas preni flavan aŭtobuson n-ro 297 (haltejo en la halo) je 9.55 aŭ 10.55 ĝis haltejo Ättekulla sommarstad. Ankaŭ linio 2 taŭgas (verda aŭtobuso). Ĝi iras 10.17 kaj 10.32 de la strato Järnvägsgatan. Vi Runristargatan kaj promeni laŭ Rusthållsgatan. Vidu supre.

Se vi bezonas pli da informoj, jen kelkaj telefonnumeroj: Ann-Louise 042-291262 (hejmo), 042-186639 (laboro), Verdandi-domo 042-292141.